

408.92 : 001

E : 5/6

LA KOSTO ANTAŬAS LA PROFITON

G. F. MAKKINK (Nederlando)

Se vi demandas al kolego kial li ne lernas Esperanton, vi ricevas la respondon, ke por li ne estas sencoplene lerni Esperanton, ĉar mankas (sciencia literaturo en Esperanto en lia fako. Kaj fakte li pravas. La sciencia literaturo en Esperanto estas neglekteble malmulta.

Tamen li malpravas. La retrodemando al via kolego estu: »Kaj kiu, laŭ via opinio, devus verki la fakliteraturon por vi en Esperanto? Ĉu la botisto, la leterportisto aŭ eble la fervojisto kiuj estas fervoraj Esperantistoj?«

Estas tute klare ke jen validas la nederlanda proverbo (eble ne nur nederlanda): la kosto antaŭas la profiton. La sciencisto mem devas verki Esperantan literaturon antaŭ ol li rajtas ekspekti ke lia fakliteraturo sin prezentas en Esperanto.

Estas precize tiu konkludo kiu necesigas nin jam nun verki sciencajn kontribuojn de pli ol nur nacia signifo en Esperanto, eventuale kun resumo en ia nacia lingvo kaj prefere ne inverse en ia nacia lingvo kun resumo en Esperanto. Se niaj neesperantistaj kolegoj prokrastas la eklernon de Esperanto ĝis ekzistas fakliteraturo en Esperanto, estas la tasko de la sciencistoj-esperantistoj prezenti tiun literaturon al ili. Kiu aliaj ja povus fari tion? Tiu konkludo estas neevitebla. La obstineco per kiu niaj neesperantistaj kolegoj evitadas la studon de Esperanto, postulas adekvatan reagon de nia flanko: ni ne evitu prezenti la mankantan literaturon en Esperanto. Ju pli obstinaj ili estas, des pli decidemaj ni agu. Nia starpunkto estu same senkompromisa kiel ilia. Ni bone konsciu ankaŭ: nur la evidenta uzado de Esperanto pruvas al tiuj kiuj decidas pri enkonduko en la lernejojn, ke ekzistas bezono pri Esperanto.

Kiuj estas la konsekvencoj de nia verkado en Esperanto? Estas du seriozaj riskoj. Unu koncernas la ŝancon ke la redakcio de sciencia periodaĵo rifuzas nian kontribuojn. La alia estas la risko ke niaj samfakuloj ne legas ĝin. Ĉu ni povas preni tiujn riskojn?

La riskon de rifuzo far la redakcio de fakrevuo ni devas preni. Jam nur pro tio ke estas grave meti ĝin antaŭ la aktualecon de la lingvo-problemo kaj antaŭ la fakton ke Esperanto efektive estas uzata. Mia sperto estas ke se vi mallonge kaj taŭge motivas la kialon de la uzado de Esperanto, oni respektas vian starpunkton kaj presos vian resumon

aŭ kontribuojn. Kelkajn taŭgajn argumentojn mi donos ĉi malsupre. Esperantajn resumojn oni al mi neniam rifuzis, eĉ ne en angla fakrevuo. La ununuran fojon ke mi prezentis plenesperantan verkaĵon, oni ankaŭ tiun akceptis.

La risko de nelegado estas ne malgrava. Kvankam mia plenesperanta artikolo estas citita de pluraj kolegoj, mi ne estas tute certa ĉu ili legis ĝin tute aŭ komprenis ĝian enhavon nur el la anglaj resumo kaj klarigoj sub la bildoj.


Por malgrandigi la riskojn de rifuzo kaj nelego mi rekomendas jenajn aranĝojn.

Car la enhavo de plenesperanta artikolo estas aŭ aspektas nekomprenebla al neesperantisto, ni aldonu tiom en unu aŭ pluraj naciaj lingvoj kiom estas necese por klarigi pri kio temas, por ke la legonto ekkonu ĉu la artikolo estas por li grava aŭ ne. Tial ni aldonu tradukojn de la titolo almenaŭ en la angla kaj rusa lingvoj. Eventuale en aliaj. Per tiuj titoloj ni pligrandigas la areon de kompreno pri la temo.

Ni plue aldonu resumon en la angla kaj se eble en la rusa aŭ aliaj lingvoj. Per tiuj resumo la legonto en pluraj lingvoregionoj povas juĝi la gravecon de la enhavo por li. Aldono de klarigoj en almenaŭ unu nacia lingvo ĉe bildoj kaj tabeloj plie faciligas al la legonto la juĝon, ĉu li ekkonu la tutan enhavon aŭ ne. Se la artikolo al li aspektas grava, li alvenas antaŭ la demando: ĉu lerni Esperanton aŭ ne? Kaj nun la decido dependas de lia informiĝo pri nia lingvo. Se li estas pli frue malbone informita aŭ havas emocian kontraŭstaron, li lasas nian verkaĵon, se ne sin prezentas tuj nova informo alloga kaj stimula. Tial mi rekomendas jenan piednoton ĉe la titolo en unu aŭ pluraj naciaj lingvoj: »Esperanto estas uzita por atingi ĉiujn sciencistojn sen prefero de lingvoregiono. Teksto en Esperanto povas esti legata kun rapide kreskanta facileco post antaŭstudo de malmultaj horoj.« Eventuale vi povas aldoni: »Estas urĝe necese ke la scienco raciigu sian komunikadon per tiu ĉi neŭtrala kaj efika lingvo.«

Kiuj argumentoj estas la plej konvinkaj por iu redakcio? Laŭ statistiko de Unesko (Scientific and Technical Translating, 2nd edition, Genève, 1957) oni povas kalkuli ke nur 34% el la tuta sciencia literaturo estas komprenebla por la tuta sciencistaro (vidu la grafikaĵon). Tiu senluziiga pocento estas efika mortbato al la inklino akcepti la anglan lingvon kiel la solan lingvon de la scienco. La pocenton de 34 mi atingis multobligante la pocenton de la publikigaĵoj en la angla (59%) el la totala kvanto da publikigaĵoj kun la pocento de la sciencistoj povantaj kompreni la anglan lingvon (57%).

Plue la statistiko montras la relative modestan lokon de la angla inter la aliaj denaskaj lingvoj de la sciencistaro (vidu la maldekstran kolonon de la tabelo). Tiu loko estos eĉ pli modesta en la estonteco. Ĉar la procento de la sciencistoj en la tutaj loĝantaroj de la diversaj landoj de la mondo tendencas al egaligo. Pro tio la estonta proporcio de la lingvoj de la sciencistoj tendencos esti la sama kiel la proporcio de la loĝantaroj de la diversaj lingvoregionoj (vidu la dekstran kolonon en la tabelo). Oni vidas ke la lingvoĥaoso — sub supozo ke la konsisto de



La vertikala flanko de la kvadrato reprezentas la totalan kvanton de sciencistoj en la mondo, konsistantan en la sciencistoj denaskaj (n) en ĉiu lingvoregiono (G germana, A angla, H hispana, F franca, J japana, R rusa, C ceteraj). La aldonaj rektanguloj reprezentas la kvantojn de sciencistoj lernintaj la koncernajn lingvojn.

La horizontala flanko de la kvadrato reprezentas la konsiston de la totala kvanto de sciencaj publikigaĵoj laŭ la menciitaj lingvoj.

Lingvoregiono	Sciencistoj kaj teĥnikistoj	
	Nun %	Potenciale %
Angla	27	9
Rusa	21	7
Ĉina	10	22
Hinda	5,5	17
Japana	2,5	1
Portugala	2	3
Ceteraj	32	41
Entute	100	100

la monda loĝantaro ne tre ŝanĝiĝos — multe pligrandiĝos en la estonteco. La vicordo tiam estos 1) la ĉina(j) lingvo(j), 2) la hinda(j) lingvo(j), 3) la angla, 4) la rusa. Ni ne forgesu la miksgrupon de la ceteraj lingvoj, atingontaj 45%! Estas klarege: la tempo favoras Esperanton, ĉar la plej gravaj lingvoj estas tre malfacilaj, la grupo de la ceteraj lingvoj kreskos kaj la partopreno de la malplej malfacila lingvo, la angla, malpli graviĝos.

Alia argumento kiu povus konvinki redakciojn estas ke ĉiu Esperanta teksto estas komprenebla al 100% de la sciencistoj, kondiĉe ke ili dediĉas nur kelkajn horojn al la studo de Esperanto.

Esperanto estas la sola lingvo kiu estas en tiu ĉi favora situacio!

Fine oni povas menciigi ke jam multaj sciencaj revuoj akceptas Esperanton (vidu Roelofs, *Scienca Revuo* 7: 144—151 (1955) kaj 10: 105—111 (1959). La nova revuo »Plant and Cell Physiology« kiu komenciĝis en 1960, eĉ oficiale akceptas manuskriptojn ankaŭ en Esperanto.

Laŭ mia opinio estas unualoke la Esperantistoj-sciencistoj kiuj respondecas pri la enkonduko de Esperanto en la sciencon. Ne per la tiel nomata propagando, sed per tio ke ili kiel memkompreneblaj aplikas Esperanton jam nun. Ĉar nur la presita kaj aŭdata Esperanto konvinkas la neesperantistan mondon.

Kaj fine ni demandu al la neesperantistaj kolegoj, kia estas ilia solvo de la komunikproblemo kaj ilia kontribuo al la solvado. Ili sciuj, ke se ili mem ne intencas lerni Esperanton, ili almenaŭ mem faru, apoguj aŭ nur ne malhelpu aranĝojn por ke la sekvonta generacio jam en la lernejo lernu Esperanton.

Wageningen, oktobro 1961.

ATENTIGO POR LA ABONANTOJ!

Ĉiu tiu numero estas sendita al ĉiuj ĝisnunaj abonantoj. La sekvan numeron ricevos nur tiuj kiuj renovigis sian abonkontizon. Vidu indikojn pri pageblecoj sur la 4-a kovrilpaĝo de nia revuo.